

THE NORTH AMERICAN

Esperanto Review

L. Benson



**KONGRESAJ
RAPORTOJ**

CHICAGO

**KAJ
MIRINDA
KOPENHAGO**

Teatra Vespero en Chicago

Septembro - Oktobro • 1962

The NORTH AMERICAN ESPERANTO REVIEW

Vol. 10, No. 5

808 Stewart St., Meadville, Pa.

DONALD BROADRIBB, Editor

Published by the Esperanto League for North America, Inc., as its official organ, and founded in 1953. The Esperanto League is officially affiliated with the Universala Esperanto-Asocio (in consultative relations with UNESCO), and is a participating organization in the People-to-People Program (John F. Kennedy, Honorary Chairman; Dwight D. Eisenhower, Chairman, Board of Trustees).

Subscription Rates: \$3.00 regular, \$2.75 gift subscription (three for \$5.00). **Membership Rates:** \$5.00, regular; \$10.00, supporting member; \$20.00, patron member; \$100, life member; \$7.00, man and wife. Checks and money orders should be payable to the Esperanto League for North America. **Send all payments and correspondence to the Esperanto League for North America, 808 Stewart St., Meadville, Pennsylvania.**

Officers of the Esperanto League for North America, Inc.: President, David B. Richardson, R.F.D. Box 81, Eastsound, Washington; Vice-President, Charles E. Peterson, 8314 E. Florence, Downey, California; Secretary, Conrad Fisher, 808 Stewart St., Meadville, Pennsylvania; Treasurer, Jay Berry, 3231 N.W. 62nd St., Seattle 7, Washington. **Executive Board:** Armin F. Doneis, Sr., P.O. Box 105, Pharr, Texas; Thomas A. Goldman, 7008 Millwood Rd., Bethesda 14, Maryland; Dorothy Holland, 1701 Rockwood Trail, Fayetteville, Arkansas; Frans J. Jahger, 2736 Locust Dr., Bridgeville, Pennsylvania; James Lieberman, 24 Claffin Rd., Brookline 46, Massachusetts; Paul Nace, 1410 Ray Road, Hyattsville, Maryland; Catherine Schulze, 410 Darrell Rd., Hillsborough, California; Roan Orloff Stone, 504 N. 5th St., Gallup, New Mexico; Martha Walker, 2846 Monticello Road, Napa, California.

Information Section of the League: 7008 Millwood Road, Bethesda 14, Maryland. **Audio-Visual Aids Department:** 1908 E. 8th Ave., Spokane 32, Washington. **Book Service:** Esperanto League Book Service, Middleton, Wisconsin. **Administration of the Review:** Francis Helmuth, P.O. Box 6215, San Diego 6, California.

Material for the next issue of the **Review** must reach the editor by the 1st of October.



KONGRESO EN CHICAGO

Laŭ raporto de
Roan Orloff Stone

La deka Kongreso de la Esperanto-Ligo por Nord-Ameriko okazis de la 6a tra la 8a de julio en la Hotelo Hamilton, Chicago, Illinois.

La tagon antaŭ la oficiala komenco, Erna Sindhwaŭ kaj Dorothy Turner gvidis ekskurson al la diversaj plej interesaj partoj de Chicago. Vizitataj estis la **Mezokcidenta Borso**, kie ekskursanoj vidis la vendadon kaj aĉetadon de akcioj, kaj la funkciadon de la borso ĝenerale; la **Federacia Banko Rezerva**, kie, interalie, oni vidis la detruigon de miloj da malnovaj, cifonaj monbiletoj; la **Gren-Borso** en la Komerca Ĉambro, kie oni vidis filmon pri la funkciado de tiu brua kaj ŝajne konfuza loko — oni ankaŭ rigardis la senĉesan agadon de la aĉetantoj, dum ili, laŭvoĉe kaj per mansignoj, aĉetadis la diversajn grenojn; la borsista firmo **Merrill, Lynch,**

Pierce, Fenner kaj Smith en la sama konstruaĵo, kie disdoniĝis literaturo pri la borsa agado kaj eksplikiĝis multaj misteroj. Post bongusta manĝo ĉe **Welty's Yankee Grille**, oni vizitis la **Instituton por Iluminacio** de Chicago, kie sinjoro Zurzin kaj Hoffman montris interesajn eksperimentojn pri diverskoloraj kaj diverspotencaj lumigiloj; la **Sinagogon** en la Loop, kie sinjoro Horowitz eksplikis la simbolojn en la granda kolorvitra fenestro; la **Rom-Katolikan Kirkon de Sankta Petro**, kie afabla sacerdoto eksplikis diversajn interesajn (kaj tie, sur la dua etaĝo, dimanĉe, Patro Sigmund celebris la meson kaj predikis en Esperanto, tuj post la fermo de la kongreso); kaj la **Chicago-Templon**, metodista kirko. Tiel finiĝis la piedvojaĝo tra Chicago.

Tiun vesperon, post bonvena ripozo,

okazis la Interkonatiĝa Kunveno, kie ĉiuj kunbabiladis kaj salutis feliĉoplene la amikojn kaj ekkonis nove renkontatajn esperantistojn.

LA MALFERMO

Vendrede, la 6an de julio, je la 9:30a matene, bonvenigis la kongresanojn la prezidanto de la Esperanto-Societo de Chicago, Robert Runser.

Kvankam persone for, prezidanto Richardson sendis magnetofonan saluton, kiun oni tiupunkte aŭdigis. Sekvis interkonatiĝo de la ĉeestantoj, kaj oni legis la salutleterojn senditajn al la kunveno. Inter ili menciendas telegramo de Ferdinand Carlson, kaj nia multjara amiko Lehmann Wendell. Ilia foresto sentigis en ĉies koro.

Laŭvice la eksterlandaj gastoj salutis la kongreson. Ilin sekvis raportoj pri la Esperanto-agado en diversaj partoj de la lando. Oni aŭdis pri Esperanto en la lernejoj, en la bibliotekoj, en la komerco, scienco, radio, televideo, kaj en la registaro. Catherine Schulze informis pri la nove eldonita klubolibro. Martha Walker raportis pri la radio-brodkasto en la programo "Breakfast Club" de Don McNeil, kaj anoncis, ke ĝi estos ripetata en la venonta lundo.

Post tio, la ĉeestantoj aŭskultis asociajn raportojn. Armin Doneis, prezidanto de la Estraro, raportis malgrandan kreskon de la asocio en 1961, de 301 ĝis 331 membroj. Diskuto emfazis, ke la grupoj, ne ELNA kaj ne la individuaj membroj, plej multe laboras por diskonigi Esperanton en Usono. La tasko de ELNA devas esti helpi tiun laboradon.

Charles Peterson atentigis pri du novaj libroj, kiujn esperantistoj devus bonvenigi: **Talking Your Way Around the World**, de Mario Pei (eldonis Crest, no. 533), kaj **The Silent Language** de Edward P. Hall (eldonis Premium). Oni rekomendis grandkvantan aĉeton de la libro de Pei, kiu enhavas valoran ĉapitron pri Esperanto.

DUA KUNSIDO

Posttagmeze, dum la sama tago, okazis la dua ĝenerala kunsido de la

LA "BREAKFAST CLUB" DE DON McNEILL KAJ NIA KONGRESO

La "Breakfast Club" de Don McNeill estas la plej malnova radio-programo en Usono, brodkastata seninterrompe de sia komenco antaŭ tridek jaroj. Aktuale ĝi estas brodkastata de pli ol 450 radio-stacioj de la ĉeno ABC. Kaj lundon, la 9an de julio, milionoj da homoj aŭdis nian membron Martha Walker, el Napa, Kalifornio, kanti "Lernejoj Tagoj" akompanate de 15 aliaj esperantistoj el la kongreso de ELNA en Chicago.

Kiam la veterana Breakfast-Clubisto salutis la aŭskultantojn per sia kutima "Bonan Matenon, Breakfast-Clubistoj," la ĉeestanta publiko tiel malforte respondis, ke li diris "Certe se mi dirus tion esperante, min tre vikle respondus tiuj personoj de la esperanta kongreso!"—kaj efektive ili tre laŭte respondis lin esperante.

Tri fremdaj gastoj speciale salutis dum la programo. Joŝiko Kajino, William Simpkins, Patro Sigmund, el Japanujo, Anglujo, kaj Aŭstralio, parolis en kaj pri Esperanto. Kaj Bob Davis, el Vaŝingtono, D.C., rakontis pri siaj spertoj.

kongreso. Dum tiu kunsido, Dorothy Holland raportis pri la varba kampanjo por gajni novajn membrojn. Oni elsendis 800 leterojn, al antaŭaj membroj, aliaj esperantistoj, kaj informpetintoj. La elsendo kostis \$75. Rezulte de la kampanjo, 5 novaj membroj akiriĝis.

Parolado de Mark Starr kaj lumbildoj montritaj de Leosh Horsky ankaŭ estas menciindaj.

PUBLIKA KUNVENO

Vendredon vespere en la publika kunveno oni povis aŭskulti du eksterlandajn vizitantojn, Joŝiko Kájino kaj Patro Sigmund. Tradukis Armin Doneis. Kantis Mary Doneis kaj Peggy Doneis, kaj prelegis angle

Robert Runser pri "Esperanto, Magia Slosilo por Vi." Du belaj japanaj dancoj ankaŭ ornamis la kunvenon, faritaj de Joŝiko Kajino.

REZOLUCIOJ

Sabaton matene, la 7an de julio, elstaris la rezolucioj, kiujn akceptis la kongreso:

1. Notante, ke la Universala Esperanto-Asocio eldonis tre gravan "Duan Bazan Laborplanon," la Deko Kongreso de ELNA varme rekomendas al ĉiuj siaj anoj kaj grupoj, ke ili studu kaj penu apliki ĝin, speciale punktojn 12an kaj 25an, kiuj rilatas al ELNA kaj la aliaj Landaj Asocioj.

2. La Deko Kongreso de ELNA oficiale laŭdas la Usonian Inform-servon (USIA) pro la sukcesa apliko de la Internacia Lingvo en la radio-programoj de la Voĉo de Ameriko, kaj varme urĝas la daŭrigon de tiu programo.

3. La Deko Kongreso de ELNA esprimas al S-ro Shriver sinceran gratulon pro la sukceso de la Pac-Korpuso. Ĝi notas, ke la sukceso plejparte venis el la fakto, ke la anoj devas lerni la lingvon de la lando, kiun ili helpas, kaj esperas, ke la Pac-Korpuso serioze studos la utilecon de la Internacia Lingvo Esperanto kiel (1) la unua fremda lingvo lernota; (2) kiel praktika ligilo por komunikado inter junuloj kaj iliaj grupoj tra la tuta mondo.

4. La Deko Kongreso de ELNA kore gratulas la aktivulojn en Kalifornio kaj aliloke pro la gravega enkonduko de la Internacia Lingvo en la lernejojn, kaj esperas, ke aliaj grupoj imitos tiun bonan ekzemplon.

5. Ĉiu membro kaj grupo legu kaj apliku la 15an paragrafon en la Dua Laborplano de la Universala Esperanto-Asocio pri UNESKO kaj la U.N.

6. La Plenum-Komitato, kiel eble plej baldaŭ, starigu fakon por la administrado de oficialaj vizitadoj kaj prelegoj de alilandaj esperantistoj. Tiu fako devus kontroli la prestiĝon kaj kompetentecon, k.t.p., de viziton-taj kaj antaŭprepari la vojradon,

808 Stewart St., Meadville, Pa.

GARANTI - DONACOJ POR LA REVUO

Responde al la alvoko dum la kongreso, ke donacoj estas urĝe bezonataj por nia **Esperanto Review**, ELNA ricevis ĝis nun la sekvantajn sumojn:

de Bonnie kaj Francis Helmuth	\$70
Thomas Goldman	50
Charles Peterson	50
Armin Doneis, Sr.	50
William H. Schulze	50
Martha Walker	50
Mark Starr	50
Paul E. Nace	50
Ges-roj Conn Murray	50
Arthur kaj Julie Regal	30
Paul E. Nace	20
Robert Runser	10
Dorothy Denison	10
Roan Orloff Stone	10
Sergio Docal	5
Ida Belle Craig	5
Roland Barta	5
Forrest Turner	5
Cecelia Peterson	2
Anonima	2
The Wills	1
The Simpsons	1

Ĉi vi bonvolos aldoni vian nomon al tiu listo?

Frans Jagher, membro de la Estraro, dum la Kongreso apelaciis al la membroj kiuj ne povas donaci \$50 al la subteno de la Revuo, ke ili imitu lian ekzemplon kaj donacu unu dolaron ĉiumonate.

Ni bonvenigas kiel **subtenantan membron** S-inon S. E. Harris, Mattoon, Illinois.

honorarion, loĝadon, k.t.p., sufiĉe frue (almenaŭ ses monatojn antaŭe). Tiel ELNA ricevos laŭeble plej grandan rezulton.

7. Memorante la laboron de la Esperanto-Societo de Chicago, kiu aranĝis ĉi tiun kongreson, ni varme dankas niajn kolegojn de Chicago.

Diskutado pri la Revuo de ELNA atentigis la membrojn, ke la eldonado de la Revuo kostas la plej grandan parton de la enspezoj, pro la malmulteco de niaj membroj. Armin Doneis legis leteron de Thomas Goldman, laŭ kiu li donacos \$50 al speciala kaso por ebligi pluan aperadon de la Revuo kun la aktuala kvalito, se naŭ aliaj membroj faros same. Kompreneble ankaŭ malpli grandaj donacoj estas bonvenaj. La ĝisnunajn rezultojn de tiu apelacio oni vidas en aparta raporteto.

Kiel **Esperantiston de la Jaro** oni elektis Catherine Schulze, pro ŝia senĉesa kaj sukcesa penado enkonduki Esperanton en la lernejojn.

Honore al Glenn Turner, nia fidela membro kaj administranto de la Libro-Servo, la kongreso donacis al li vivmembrecon en ELNA.

Oni anoncis la rezulton de la kalkulado de la balotoj:

Por sekretario:

Conrad Fisher, 47 balotoj

Por la estraro:

Dorothy Holland, 45 balotoj

Roan Orloff Stone, 38 balotoj

Thomas Goldman, 30 balotoj

oni ankaŭ kalkulis 28 balotojn por David Garson kaj 14 por Edward Pharo, Jr., por la Estraro.

Sabaton posttagmeze oni ĝuis aŭtobusan ekskurson al la parkoj, muzeo kaj strando, kaj poste gaje ĝuis ŝipekskurseton. Post la reveno, okazis la **Bankedo**, dum kiu grupo de junuloj prezentis dramon "Sinjoro Neniam Lavigis." Tradukis esperantan la dramon Arthur Regal, kaj reĝisoris Vivian Runser. Tre aplaŭdindaj estis la aktoroj: John McClure (Diablo), John Marchesi (Soldato), Dennis Runser (Avo-diablo), Paula Lawson (Plejaĝa princino), Carol Whiteside (Dua princino), Barbara Runser (Tria princino).

Fine de la raporto, necesas mencii, ke dum la kongreso rigardebla estis la Migranta Esperanto-Ekspozicio, portita el St. Louis kaj bele aranĝita de George Falgier. Ankaŭ la kunvenejon bele ornamis portreto pri Zamenhof, pentrita de Jos. Eisele.

NOVA AUD-VIDA FAKO EN ELNA

ELNA nun establis propran aŭdvidan fakon por esperantistoj en Usono kaj Kanado. La unua entrepreno de la fako estas **Sonbendo de la Monato**. Grupoj, klubanoj, kaj individuoj povas prunte ricevi du prelegojn ĉiumonate. La programoj estas registritaj per rapideco de 3 $\frac{3}{4}$ coloj ĉiusekunde, do ilin povas paroligi la plej multaj magnetofonoj. Sepcola bobeno enhavas du prelegojn po 30 minutoj, do sume unu horon da parolado. Ankaŭ diversfoje la servo dissendas sonbendeton specialan, kiel la bendon pri la kopenhaga kongreso.

Kotizo por tiu servo estas kvin dolaroj jare. Krome oni deponas kvin dolarojn por garanti kontraŭ mistraktado de la bendoj. Uzanto de la servo ricevas almenaŭ sesdek dolarojn da valoro ĉiujare.

Bendoj uzataj de la servo estas de la magnetofona servo de la Universala Esperanto-Asocio. La enhavo de la ELNA-fako ankoraŭ estas malgranda, sed la voĉoj de Lapenna, Auld, Waringhien, Hideo Yagi kaj aliaj vokas vin, kaj la servo kreskos. Jen kelkaj sonbendoj haveblaj:

La problemo de malsato en la mondo (Prof. Albaut)

Nuntempa literaturo (William Auld)

La Universala Deklaracio pri la Homaj Rajtoj (Ivo Lapenna)

Traduki artverkon, ĉu utopio? (Ivo Rotkvič)

Domago de la atombomboj en postaj jaroj (Hideo Yagi)

La etimologio en naciaj kaj internacia lingvo (Prof. Colinson)

Henriko Heine (Gaston Waringhien).

Ili estas komenco—aliaj sekvos. Por uzi la servon, sendu viajn kotizon kaj deponon, kaj indiku vian preferon pri la unua sonbendo, al H. K. Ver Ploeg, 1908 E. 8th Ave., Spokane 32, Washington.

MEMBROJ DE LA KONGRESO

Registris sin 83 personoj. La Interkonatigan Vesperon partoprenis 75, la Publikon Kunvenon ĉeestis 135, kaj la Bankedon ĝuis 110. Inter la ĉeestantoj ni bonvenigis plurajn eksterlandajn esperantistojn:

Joŝiko Kajino, el Japanujo
Rosa Scolnik, el Argentino
Bertha Stauble, el Svisujo
L. Horsky, el Britujo
P. Sigmund, el Aŭstralio
W. L. Simkins, el Britujo
Max Valentinuzzi, el Argentino.

Registritaj usonaj esperantistoj en la kongreso venis el 15 ŝtatoj. Ili estis:

Mary C. Albright, Pennsylvania
Margaret L. Berkley, California
Roland Barta, Colorado
Ges-roj William P. Bulthouse, Illinois
Andrew Chmielewicz, Pennsylvania
Ida Belle Craig, California
Ruth M. Culbert, Washington
Robert M. Davis, Washington, D.C.
Jose Delfino, New York
Ges-roj Joseph Denison, Illinois
Ges-roj Armin F. Doneis, Texas
Peggy Doneis, Texas
Peter Doneis, Texas
Sergio Docal, Washington, D.C.
George J. Falgier, Missouri
John Futran, New York
S. C. Gilfillen, Illinois
Lee Gridley, Illinois
Erna Guesnier, Illinois
Eileen Haavik, Maryland
Juanita Hamilton, Illinois
Sara E. Harris, Illinois
Helen Hasselriis, New York
Ges-roj Francis Helmuth, California
Lisa Helmuth, California
Ges-roj Roy Holland, Arkansas
Americo de Jesus, Rhode Island
Frans J. Jahger, Pennsylvania
Frank J. Kovarik, Illinois
Ges-roj Charles M. Landstrom, Illinois
Fernando Martinez, New York
Jesse L. McCowan, Illinois
Eleanor McGrogan, Ohio
Mary Milton, Illinois
Ges-roj Conn Murray, California
Ges-roj Joseph Murray, Michigan

Ges-roj Charles E. Peterson, California
Ges-roj Frank Pflieger, Illinois
Carlos Porespo, Massachusetts
Arthur Regal, Illinois
Julie Regal, Illinois
Anna Reichman, Illinois
Ges-roj Robert Runser, Illinois
John Sabin, Missouri
Ges-roj William Schulze, California
Ges-roj Bruce Sherwood, Illinois
William Simpson, Pennsylvania
Etta Simonek, Illinois
Erna Sindhwad, Illinois
Ges-roj Lucian Spriggs, Jr., Pennsylvania
Ges-roj Irwin L. Stein, Missouri
Rosemary Stein, Missouri
Mark Starr, New York
Roan Orloff Stone, New Mexico
Catherine Thompson, Ohio
Herman Tobusch, Illinois
Ges-roj Forrest D. Turner, Illinois
Glenn Turner, Wisconsin
Ges-roj Dean Walker, California
Elfrieda D. Walters, Illinois
Martha Weaver, Illinois
Ges-roj Robert L. Wills, Ohio

GEORGE SAVILLE

En pli frua numero de la **Revuo** ni menciis la morton de nia membro George Saville, la 2an de januaro, 1962. Ni nun prezentas kelkajn informojn pri lia vivo: li naskiĝis la 3an de majo, 1879, en San Francisco. De sia 2a ĝis sia 17a jaro li loĝis en Pollando, sed li revenis al Usono. En 1921 li iĝis fervora esperantisto. Li verkis multajn artikolojn pri politikaj kaj ekonomiaj temoj, kaj poste tradukis en Esperanton gravajn verkojn, i.a. **La Fera Kalkanumo** de Jack London, **La Judoj sen Mono** de Michael Gold, **Rigardu la Teron** de H. Van Loon, kaj rakontojn de O'-Henry k.a. Li postlasis du prespretajn manuskriptojn: **La Historio de la Homaro** de Van Loon, kaj **Arrowsmith** de Sinclair Lewis. Inter nefintradukitaj verkoj ni menciis **La Rakonto pri Du Urboj** de Dickens. Sian edzinon li renkontis en esperanta klaso en Novjorko, kaj ili geedziĝis antaŭ 41 jaroj.



CONVENTION IN CHICAGO

The tenth annual convention of the **Esperanto League for North America** was held in Chicago, Illinois, June 6 through 8. It was one of the most successful meetings held by the association. 83 persons were registered, while 110 attended the banquet and 135 were present at the public meeting.

Highlights of the convention included an early excursion to some of the show places of Chicago, on the 5th: the stock exchange, the Federal Reserve Bank, the grain exchange, and various churches; presentation of a play by a very competent group of youthful Esperantists; and a considerable amount of work concerning the activities of the association. The new "Manual for Esperanto Clubs" was presented by Catherine Schulze, who, in turn, was chosen "Esperantist of the Year" by the enthusiastic conventioners. This honor was partially due to Catherine Schulze's energetic work in introduc-

p. 104

ing Esperanto into the curricula of several public grammar schools in California.

Don McNeil's popular radio program, the **Breakfast Club**, surprised the nation on Monday, July 9, with participation by members of the convention speaking in and about Esperanto. The program was taped during the preceding week, while the convention was still being held. Several of ELNA's foreign guests, Joško Kajino from Japan, William Simpkins from England, and Father Sigmund from Australia, spoke during the broadcast.

On a less positive note, the membership reports for the past year showed that the association gained only 30 new members, making a total of 331. This year, a campaign for new members, including 800 letters sent out, brought in only 5 new memberships.

FERD CARLSON MORTIS

Kun la plej granda bedaŭro ni devas komuniki, ke la 25an de aŭgusto, en Seattle, Wash., mortis Ferdinand Carlson, iama redaktoro de nia Revuo, kaj unu el la fondintoj de ELNA. Li estis dumviva membro kaj nia unua Estrarestro.

“Ferd” Carlson naskiĝis en Cadillac, Mich., en oktobro, 1901. En 1907 lia familio transloĝiĝis al Seattle, Wash., kie li ĉiam loĝis poste. Li fariĝis tramisto en 1927, kaj restis en tiu profesio ĝis emeritiĝo en 1961.

Li lernis Esperanton en 1934, kaj fariĝis aktiva en la tiama Societo Esperantista de la Verda Lago (SEVLO) kiel ankaŭ en la Societo Esperantista de Seattle, kaj estis iam prezidanto de ambaŭ organizaĵoj.

Ĉirkaŭ 1949 Ferd fariĝis amatora presisto, kaj starigis en sia kelo malgrandan presejon. Post la fondiĝo de ELNA li komencis helpi pri la preparado de la Revuo, kaj ekde 1955 mem presis la tutan gazeton. De aŭtuno, 1955 ĝis 1960 li estis ankaŭ redaktoro.

Ĉiam aktiva kaj sindona al nia afero, Ferd estis nomita “Esperantisto de la jaro” kaj “Emerita redaktoro” ĉe la 1960—a kongreso en Washington, D. C.

Ne nur inter esperantistoj Ferd estis bone konata en Seattle. La ĵurnaloj ofte aperigis artikolojn pri li, aparte pro liaj unikaj faroj kiel buskondukisto. Li havis eksterordinare profundan voĉon, per kiu li ĉiam laŭte kaj detale anoncis la stratojn kaj transirajn liniojn, kaj ĉe certaj haltejoj, la listo de transiraj linioj estis longega. Sen paŭzo por spiri, Ferd anoncadis ilin ĉiujn per vibra basa voĉo taŭga al ŝekspira aktoro. Novaj pasaĝeroj ofte gapis mire, ne malofte eĉ aplaŭdis.

Certajn haltejojn Ferd anoncis per rimoj, ekzemple, ĉe la zoologia ĝardeno:

“The closest stop for the Woodland Park Zoo,
The camel, the cougar and the kangaroo,
The badger, the beaver, and Bobo too.



You're bound to laugh at the
tall giraffe
And that ain't half what's waiting
for you
At the Woodland Park Zoo.”
Ofte li aldonis iom al tio, ekzemple:
“The tiger had kittens,
And I would too,
If they locked me in a cage
At the Woodland Zoo.”

De tempo al tempo Ferd portis kun si en la buso grandan sakon da dolĉaĵoj, kiujn li donacis al la infanaj pasaĝeretoj. Li ankaŭ presis vizitkartojn kun sia nomo kaj, dorsflanke, poemojn aŭ—plej ofte—informojn pri Esperanto. Tiujn li donacis al la mirantaj pasaĝeroj kiel suvenirojn pri la veturo.

Ferd komencis sian tramistan karieron sur linio, kondukanta al loko nomita “Endolyne”, kio signifas “finstacio.” Nun li iris al tiu Lasta Finstacio, al kiu iam ni ĉiuj estos pasaĝeroj.

Adiaŭ, Ferd. Ni tre sentos vian mankon.

DBR

BELEGA KONGRESO EN "MIRINDA KOPENHAGO"

Se "lingvo estas socia fenomeno," kiel ni ŝatas diri en nia informado, certe la Esperanta socio estas aparte fenomena. La sorĉo de la esperantismo fakte ne troviĝas en la simpla ebligado de interpopola komunikado, sed en la proksimigo, laŭ homaj valoroj, kiun ĝi nepre kaŭzas inter uzantoj de la lingvo. Tiel estas ke la Universalaj Kongresoj—escepte por kelkaj ŝlosilaj personoj en la movado—estas gravaj ne pro la formala organiza kaj administra laboro farata, sed pro la ebleco kiun ili havigas por sperti tiun sorĉon, esti ravita kaj kuraĝigita per ĝi.

Tion mi ĵus spertis la duan fojon en la vivo, kaj la unuan post dek-unu jaroj. Neeblas ĉi tie kondensi ĉiujn travivaĵojn de tiu semajno en Esperantujo en du mallongajn paĝojn; sed mi deziras almenaŭ mencii kelkajn ĉefajn punktojn.

Ok usonanoj, se mi ne eraras, partoprenis la Kongreson en Kopenhago. Por S-ano Frans Jahger, el Pitsburgo, kiel ankaŭ por Anĝelurba S-ino Paula Parrish, ĝi estis ankaŭ hejmenveno, ĉar ili ambaŭ tie naskiĝis. Por mi ĝi estis ankaŭ afervojaĝo, ĉar mi devis fari esplorojn, surbendigojn, kaj intervjuojn por tuta aro da artikoloj, radiatoraportoj, ktp., por celoj parte esperantaj, parte ne. Unu samnaciono estis jam aŭtomobilinta tra pluraj eŭropaj landoj en brilnova Mercedes-Benz'o. Almenaŭ du aliaj usonanoj partoprenis antaŭkongresajn perfektigajn kursojn.

Kaj fakte la plej frapa por mi, post tiom da jaroj, estis la multe pli alta lingva nivelo de la kongresanoj ĝenerale. En Munkeno la lingvo efikis sed iom malrapide kaj balbuteme. Mi memoras plurfoje kiam inter la publiko ĉe prelegoj aŭdiĝis plendoj, "parolu pli malrapide" se la preleganto normalrapidece parolis, kaj nur Prof. Lapenna kuraĝis admoni: "Ĉu *vi* ne



● la marvirineto

povas pli rapide aŭskulti?" En Kopenhago mi neniam aŭdis tiajn plendojn, sed kontraŭe, en la preleghaloj, kiel en la kunvenejoj, kaj en la tramoj, la restoracioj, ĉie kien vagis la samideanoj, fluis lingvo en veraj verdaj torrentoj, flugis la vortoj kun facilco kaj sprito indikantaj la multe pli maturan lingvoregadon de la hodiaŭaj Esperantistoj.

En la inaŭguro, kiu okazis en la belega koncertsalonego en Tivoli, mi havis la honoron saluti la kongreson nome de ELNA. Laŭ propono de S-ino Schulze mi atentigis, ke la nura grava konkuranto de Esperanto nun estas—la angla lingvo, kaj urĝis ilin ne subteni la movadon por internaciigi tiun lingvon, ŝafe mem uzante ĝin pidĝine dum la vojaĝoj. Oni multe aplaudis tion, kaj poste en la festparolado D-ro Lapenna revenis al la sama punkto.

"La homaro ĉiam pli kaj pli bezonas komunan lingvon," diris la oratoro. "devas esti trovita kaj verŝajne estos trovita solvo jam en la nuna generacio . . . Estas nur du eblecoj . . . nacia lingvo, eble la angla, aŭ la Internacia Lingvo. La akcepto de unu lingvo signifus utilon por unuj . . . kaj grandajn malavantaĝojn spiritajn, kulturajn, intelektajn kaj moralajn por

ĉiuj aliaj . . . ” Sed se “ni povos agi per komunaj fortoj . . . mi garantias, ke ni atingos multajn novajn sukcesojn, kaj eble ni atingos eĉ la finan venkon jam en tiu ĉi generacio . . . Antaŭen por la bono de Esperanto! Antaŭen por la bono de la tuta homaro!”

Tiel komenciĝis la semajno. Sekvis la kunvenoj laboraj tage, kaj la aranĝoj distraj, ĝuaj, vespere. En la Komitato mi anstataŭis nian reprezentanton, S-ron Peterson, kiu ne povis veni al Kopenhago. Post multa diskutado kaj klarigado, kaj post kelkaj malgrandaj ŝanĝoj en la vortumado, oni akceptis la novan laborplanon de UEA. La Komitato ankaŭ—eĉ unuanime!—elektis novan Estraron, en kiu servos denove kiel Ĝenerala Sekretario Prof. D-ro Lapenna, kaj kiel Prezidanto servos D-ro Hideo Yagi, el Tokio Japanujo. La nova konsisto de nia gvidantaro havas la plej vere internacian karakteron, verŝajne, en la tuta historio de la movado.

Ĉeestis la Kongreson la eminenta bardo hungara, Julio Baghy, kiel reprezentanto de la nacia grupo en tiu lando. La peto de la hungaroj por akcepto kiel oficiala aliĝinta landasocio estis aprobata de la Komitato, kiel ankaŭ estis simila peto de la asocio en Libano, tiel ke la membraro de UEA nun estas proksime al 33,000—la plej granda en ĝia historio.

Vesperaj aranĝoj estis brilaj, humorplenaj, ĝuegataj. La bankedo, la balo, la teatraĵoj, distra vespero, la ĵunulara vespero estos neniam forgesitaj. Same pri la neformalaj, hazardaj okazintaĵoj, la konatiĝo kun novaj amikoj, ĉiaspecaj aventuroj kaj surprizoj. La ven-

dreda soleca ĉumnokta vagado apud la kanaloj ĉe Nyhavn, poste la sabata averto eviti tiun lokon, “la plej danĝeran en la mondo,” kie neakompanata ĉeesto estas “certa invito al mortigo!”

Sed tro rapide ĉio venas al sia fino kaj ankaŭ la Kongreso. Kio pli emociiga ol la trista etoso de la ferma kunsido, la kantado de “La Espero,” la “ĝis revido en Sofio?”

Tamen mi ne finu ĉi tion sur tia malgaja tono, sed per mencio de vizito al la Hanna-lernejo, kie partoprenis sian propran kongreseton 56 infanoj el naŭ landoj. Ĉiuj infanoj perfekte parolis la lingvon kaj ili estis multege intervjuataj kaj priraportataj en la gazetaro kaj la radio. Ankaŭ iris raportisto de la pola radio, kiu oficiale kaj *pagate* ĉeestis en Kopenhago, kaj ELNA-estranaro Jahger, kies rego de la dana lingvo (kiu cetere ne estas lingvo, sed gorga malbonfarto, kiel diras la danoj) estis nemalhavebla ĉe taksistoj, tramkonduktoroj ktp. Armita per magia pluvombrelo (Jahger jam konis la kaprican Kopenhagan veteron) kaj brakhorloĝo neniam ŝanĝita de la Pitsburga horsistemo (“Oni ne povas ŝanĝi *mian* opinion”) Frans rave distris la infanojn dum S-ro Uspienski kaj mi sonbendis kaj fotografis ilin.

Kio pli esperiga ol la vido de tiuj 56 infanoj, harmonie ludantaj, vivantaj, petolantaj, por kiuj la limoj de landoj, nek diferencoj gentaj nek rasaj ne havis ian signifon? Kio pli instiga al ni plimultigi niajn laborojn por Esperanto, ol pensi pri tio, kia povos iam esti tuta mondo, en kiu regos tiu sama harmonio?



NOVA HELPLIBRO POR ESPERANTO-KLUBOJ

Jus aperinta en la angla lingvo, kun la titolo "Manual for Esperanto Clubs," estas nova, mimeografita, kvardekpaĝa libro celanta helpi al la kluboj en ilia diskonigado de Esperanto. La prezo de la libro estas \$2, kaj inkludas senpagan ricevon de suplementoj aperontaj poste. La libro enhavas la sekvantajn artikolojn:

The Total Esperanto Movement
(Role of individual, local, national)

La Principaro de Frostavallan
Letters to the Editor

On Free Publicity for Esperanto
How to Get Feature Stories in the
Papers

The Public Library: A Willing
Ally

How to Get on Radio and Tele-
vision

Esperanto Courses on Radio
Esperanto in the Phone Book
Public Speaking for Esperanto

About National Magazines

ELNA Migrating Exhibit

Club Organization

Teaching Esperanto (Materials,
Technics)

Esperanto in Elementary Schools
Syllabus and Course of Study for
Elementary Schools

Graĵoj en Vento (Sample page)

A Few Words About Baha'i

Mondvida Tago

Report of California Elementary
Schools

Ci tiu verketo donas praktikajn suges-
tojn por helpi al via grupo. Estas
tre rekomendate, ke ĉiu grupo akiru
kaj legu ĝin. Oni mendu ĝin de
Conrad Fisher, 808 Stewart St.,
Meadville, Pennsylvania.

AGOJ DE LA ESTRARO

(63-I) La membrotizoj de ELNA
restu je la nuna nivelo; do \$5 por
ordinara membro; \$10 por Subten-
anto; \$20 por Patrono; \$100 por
Dumviva Membro.

(63-II) La abonprezo por la Re-
p. 108

KOREKTOJ

La aperado de recenzoj pri nia
speciala numero (1961) indikis al ni
kelkajn erarojn, kiujn la legantoj eble
volos korekti en siaj ekzempleroj:

p. 19, linio 10: post "publication"
legu punkton, kaj ne komon
(**Kooperativismo** ja ne estas
eldonata de Intersteno!).

linio 12: oni atentigas ke **La
Migranto** ne estas nudista gaz-
eto, sed gazeto de natur-
amikoj. Ni pardonpetas pro la
eraro.

linio 16: ŝajne pluraj per-
sonoj mislegis ĉi tiun linion.
Ni do atentigas ke la epitetoj
"heavily financed and unusually
luxurious" aplikiĝas nur al la
gazetoj menciitaj ĝis **Kun-
homaro**, kaj ne al la nomoj
menciitaj komence kun **Kun-
homaro**. Cetere, ni certigas al
kelkaj dubemuloj ke tiu lasta
gazeto (**Kunhomaro**) estas
reala.

vuo plialtigu per unu dolaro en ĉiu
kategorio; do abono, \$3; donac-abono,
\$2.75; tri donacabonoj, \$5; 18 ekzem-
pleroj de la sama numero, en amas-
mendo, \$5.

(63-III) Ni malaltigu la eldon-
nombron de la Revuo al 700 ekzem-
pleroj ĉiunumere, ĝis pli alta kvanto
pruviĝos necesa.


(63-IV) Ni malaltigu la procent-
aĵon de 100% ĝis 75% de la nombro
da ELNA-membroj necesaj en loka
klubo por rajtigi kotizrabaton al la
klubo. Do nur 75% de la klub-
membroj bezonas esti validaj mem-
broj de ELNA por rajtigi tiun klub-
on ricevi rabaton anoncitan sur p. 5
de la januara numero de la **Revuo**.
Krome, la rabato estas de nun aplik-
ebla al ĉiu klubo, negrave kiom da
membroj ĝi havas.

(63-V) Ĉiuj monsumoj por abonoj
kaj kotizoj estu direktataj unue al la
Sekretario, kiu siavice enskribos ilin
kaj pluensendos ilin al la Kasisto, por
ebligi duoblan kontrolon pri la mem-
brolisto.

Esperanto Review, Sept.-Okt. 1962

esperanto

lingvo internacia



NOVAJ INFORMILOJ

eldonitaj de ESPERANTO PRESS, Oakville, Ontario, Kanado.

1. LA BAZA INFORMBROŝURO estas represo de la anglalingva informnumero de 'Kanada Esperanto-Revuo' (Jan/Febr. 62). Por ke tiu broŝuro allogu aĉetantojn, ĝi ricevis modernan dukoloran titolpaĝon. Ankaŭ la poste anoncigitaj novaj informiloj ĝis n-ro 7 utiligas la saman okulfrapan desegnon, kiu vere simboligas la parolforton kaj internaciecon de nia lingvo, kaj kiu aperas ankaŭ sur tiu ĉi prospekto.

La titolo de la broŝuro 'esperanto - lingvo internacia' estas klarigita anglalingve: "facts about the living international language - who uses it? - why is it easy? - why learn it? - why promote it?" Sur la dua paĝo, kie estas menciitaj la adresoj de esperanto-asocioj en angle parolantaj landoj kaj la adreso de UEA, troviĝas spaco por ebligi la enstampon de adreso de loka grupo aŭ esperantisto.

Pri la enhavo de tiu broŝuro skribas s-ro Auld en 'esperanto, junio 1962': "Sur 44 paĝoj troviĝas artikoloj pri diversaj aspektoj de nia lingvo kaj movado, tute ĝisdataj kaj bele ilustritaj. Ĝi estas eble la plej trafa anglalingva varbilo en ekzisto."

Prezo: 5 steloj (US\$ 0.35); 10 ekz.: 39 steloj (US\$ 2.75); 50 ekz.: 150 steloj (US\$ 10.50); 100 ekz.: 286 steloj (US\$ 20.00).

Se montriĝos sufiĉe da intereso Esperanto Press eldonos tiun broŝuron eble ankaŭ kun pli forta kovrilo, por ke ĝi taŭgu por publikaj bibliotekoj. La prezo estos ĉ. 10 steloj. Interesuloj bonvolu anonci sin al la eldonejo.

2. FLUGFOLIO POR AMASA DISTRIBUO. (Angla. Formato 8 x 16 cm) Ĝi surhavas la saman dukolore presitan desegnon kaj donas respondojn al la demandoj 'Why Esperanto?' kaj 'Why should I learn Esperanto?'. Sur la tria paĝo estas represita 'Esperanto at a Glance' kaj sur la kvara paĝo estas indikitaj la adresoj de la landaj asocioj, de UEA, kaj spaco por enstampi la adreson de loka grupo aŭ esperantisto, al kiuj oni sendu la ekvivalenton de 5 steloj por ricevi la supre menciitan bazan informbroŝuron.

Prezo: 100 ekz.: 4 steloj (US\$ 0.28); 1000 ekz.: 30 steloj (US\$ 2.10)

Krom la reklamo por la baza informbroŝuro Esperanto Press volonte presos sur la lasta paĝo de la flugfolioj alian tekston, por ekz. anonci novan kurson, korespondan kurson ktp. La aldona kosto por la tekstŝanĝo kaj presplatfarado estas 85 steloj (US\$ 5.95) sendepende de la kvanto da flugfolioj aĉetotaj laŭ la supraj prezoj.

3. AFIŜETO DUKOLORA (Formato 24 x 32 cm). Ĝi estas pligrandigita represo de la unua paĝo de la nova flugfolio. Sub la teksto estas ankoraŭ sufiĉe da spaco por anonci kurson, kunvenon ktp. kaj por indiki lokan adreson.

Prezo: 10 ekz.: 7 steloj (US\$ 0.49); 100 ekz.: 50 steloj (US\$ 3.50).

Enpreso de anonco sub la teksto kostas 85 stelojn (US\$ 5.95) por kompostado kaj presplatfarado sendepende de la kvanto de la afiŝetoj aĉetotaj laŭ la supraj prezoj.

4. DISDONILO DE FLUGFOLIOJ. (Formato 32 x 35 cm) Sur forta kartono estas gluita la afiŝeto kaj poŝo kun la surpriso 'Take one', en kiun oni povas enmeti 100 flugfoliojn. Pendigu ĝin en iu ajn publika loko, ĉe via kuracisto, frizisto, vendisto ktp., kaj vi tiel atingos, ke la novaj flugfolioj estos distribuataj sen malŝparo, kaj ke interesitaj personoj estos instigataj informiĝi pli detale pri nia lingvo. Sur la poŝo estas multe da spaco por anonci kurson aŭ indiki lokan adreson.

Prezo: 4 disdoniloj kun po 100 flugfolioj: 20 steloj (US\$ 1.40)

5. VENDILO DE LA INFORMBROŜURO. (Formato 32 x 41 cm) La afiŝeto estas gluita sur iom pli granda kartono por ebligi la enmeton de 10 informbroŝuroj en poŝon, sur kiu estas grandlitere presita: "35 c - facts about the living international language - who uses it? - why is it easy? - why learn it? - why promote it?." Donu tiun vendilon komisie kun kelkaj informaj broŝuroj al via libro- aŭ gazetvendisto. Li repagu al vi la monon post vendo de la broŝuroj.

Prezo: 1 vendilo kun 10 informbroŝuroj: 39 steloj (US\$ 2.75)

4 vendiloj kun 40 informbroŝuroj: 120 steloj (US\$ 8.40)

6. LETERPAPERĜO. (Formato 21,5 x 28 cm) Ĝi surhavas en la maldekstra supra angulo la modernan dukoloran desegnon kun la teksto 'esperanto - lingvo internacia'.

Prezo: 50 folioj: 11 steloj (US\$ 0.77), 1000 folioj: 150 steloj (US\$ 10.50).

Enpreso de adreso de loka klubo aŭ individua esperantisto kostas 85 stelojn (US\$ 5.95) sendepende de la kvanto de la leterpapero aĉetota laŭ la supraj prezoj.

7. GLUMARKOJ. (Formato 5 x 5 cm). Ĝi enhavas la saman desegnon kaj tekston kiel la leterpapero kaj estos havebla komence de 1963.

Antaŭmenda prezo: 100 glumarkoj: 4 steloj (US\$ 0.28)

1000 glumarkoj: 28 steloj (US\$ 1.96)

Se minimume 10 grupoj aŭ individuoj mendos ĝis la 31.12.1962 po 1000 glumarkojn, mi povus kontraŭ kroma pago de 25 steloj (US\$ 1.75) super la glumarkoj surprisi iliajn adresojn. Mendu kiel eble plej baldaŭ, por ke mi povu presi la ĝustan kvanton.

Esperanto Press intencas eldoni samspecajn informilojn aŭ varbilojn ankaŭ en aliaj lingvoj. Necesas nur, ke kompetentaj esperantistoj traduku aŭ adaptu ilin al iliajlandaj bezonoj, kaj ke la landaj asocioj garantiu la aĉeton de certa kvanto. La tekstoj estu prefere kompostitaj en la koncernaj landoj.

ALIAJ INFORMILOJ HAVEBLAJ DE ESPERANTO PRESS

8. ESPERANTO - Comments and Commentary.

Represo de artikolo de Dorothy Henderson el la baza informbroŝuro. (4 paĝoj, 14,8 x 21 cm). Prezo: 100 ekz.: 15 steloj (US\$ 1.05); 500 ekz.: 57 steloj (US\$ 3.99)

9. "One Language for the World. How it was used by people from 35 countries at the 46th Universal Esperanto Congress held in August 1961 at Harrogate, England" de Dorothy Henderson. (12 paĝoj, 14,8 x 21 cm).

Prezo: 10 ekz.: 7 steloj (US\$ 0.49); 100 ekz.: 57 steloj (US\$ 3.99)

10. "Voice of Women and the Language Barrier" de Vilma Eichholz. Represo de poresperanta artikolo el la novaĵletero de Voĉo de Virinoj. (4 paĝoj 14,8 x 21 cm).

Prezo: 100 ekz.: 15 steloj (US\$ 1.05); 500 ekz.: 57 steloj (US\$ 3.99).

11. "Labor and the Curse of Babel" de Mark Starr. Represo de artikolo el la North American Esperanto Review. (2 paĝoj, 14,8 x 21 cm)

Prezo: 100 ekz.: 7 steloj (US\$ 0.49), 1000 ekz.: 60 steloj (US\$ 4.20).

12. "Pope Pious X, Patron of Esperanto" de Gabriel N Pausback. Represo de artikolo el 'MARY'. (4 paĝoj 12,5 x 17 cm)

Prezo: 100 ekz.: 15 steloj (US\$ 1.05); 1000 ekz.: 110 steloj (US\$ 7.70)

13 "The Structure of Interlingua compared with Esperanto's structure" de Ivy Kellerman Reed. Tium lerte verkitan artikolon oni donu al personoj kiuj opinias, ke Interlingua povus esti pli bona lingvo ol Esperanto. Ĝi ne estas destinita por amasa distribuo. (8 paĝoj 8,3 x 21 cm)

Prezo: 1 ekz.: 1,5 steloj (US\$ 0.10); 10 ekz.: 7 steloj (US\$ 0.49);
100 ekz.: 40 steloj (US\$ 2.80).

14. "Life of Zamenhof" de Edmond Privat. Angla traduko de Ralph Elliott. (En preparo). La tria eldono enhavos ankaŭ faktojn pri la nuna stato de la esperanto-movado kaj klarigos la strukturon de nia lingvo. Prezo: 18 steloj (US\$ 1,26)

ALIAJ ELDONAĴOJ HAVEBLAJ DE ESPERANTO PRESS

Terminaro por Infan-ludoj. (Verkita de la Societo de Britaj Esperantistaj Geinstruistoj). La terminaro priskribas multajn ludojn pri kiuj ankaŭ plenkreskuloj interesiĝos. 28 paĝoj, 11 x 16 cm. 4 steloj US\$ 0.28

Radio-Terminaro de A. Venture. 34 paĝoj, 11 x 16 cm. 4 steloj US\$ 0.28

Muzika Terminaro de M.C. Butler kaj F. Merrick. 36 paĝoj, 11 x 16 cm 4 steloj US\$ 0.28

Kudra kaj Trika Terminaro de M. kaj V. Verda. 21 paĝoj, 11 x 16 cm 4 steloj US\$ 0.28

Pulĉinelo - Konstrua vortludo por 2-6 personoj. La ludilo konsistas el 6 'konstruejoj' (kartonoj sur kiuj oni interkruce konstruas vortojn kaj frazojn), 220 grandaj literoj esperantaj, 239 vortradikoj, 82 prefiksoj kaj sufiksoj, 164 gramatikaj finaĵoj kaj 15 'pulĉineloj'. 7 steloj US\$ 0.49

Ĉiujara murkalendaro - . Grandformata (29 x 21 cm) monata kalendaro el helflava kartono kun plastaj bindiloj. Per sistemo de slipoj oni indikas la semajntagojn, tiel ke la kalendaro estas ĉiujare uzebla. Libera spaco sur la monataj folioj ebligas ŝanĝon de la ornamo per bildkartoj, eltranĉaĵoj el gazetoj ktp. 11 steloj US\$ 0.77

Unitarismo - realigita Homaranismo. Kompilita kaj tradukita el la angla de Rüdiger Eichholz.

